

Mensuel
Numéro 62
Fevrier 2010

La SAGO

La Sat-Amikara GazetO

*Espéranto :
vers une culture sociale sans frontières.*

Zone euro : 3,50 €
Suisse : 5 FS
Autres pays : 4,50 €



**Ni rendevuu
lastpaĝe
antaŭ Hiliono !**



Vojaĝu plum-peze per Esperanto

PAUL
SAGOT

Flore kuiro !

Terpom-benjetoj

Por 6 personoj:

- 6 dikaj terpomoj
- 1 ovo
- 2 kulregoj da faruno
- 2 cepoj
- oleo

Lavu kaj senŝeligu la terpomojn. Raspu kaj sekigu ilin.

Tranĉu la cepojn en pecetojn. Miksu ĉion kune, terpomojn raspitajn, cepojn, farunon kaj ovon.

En pato kun oleo, fritu buletojn el ĉi-tiu pasto, dum ĉirkaŭ 2 minutoj ambaŭflanke.

Flora Markov



konkurso

Nova emblemo por SAT-amikaro

Jen la laste ricevitaj kontribuoj. Vidu paĝon 14.



C



E



F



FB



D1



SAT-Amikaro

D2



D1a



S.A.T. D1b



D1c



G

Ĉe la lago

far Sir'

kroniko pri la ĉiutaga vivo en Anci' Epizodo 62

Aĥ! Jen la bankostumoj ! Mi facile vin imagas en ili !

unupeca modelo... 27 €...

Bikino 38 €...

Ŭa! du-tri ŝnuretoj kaj deko da tolaĵ kvadrataj centimetroj, 64 € !!!

Nekredeble ! ju pli eta des pli kosta !

ne nur materialo pagiĝas karulineto, ja ankaŭ la stilo !

Nu, pasintjare, kiam ni feris sur nudisma plaĝo, mi kredis ke tio celis ŝpari la elspezon de bankostumo...

sed ŝajnas male ke,

kun maksimuma stilo, kaj minimuma materialo, vi tutcerte elspezis ja sumegon !

Kial.....? Ĉar....!

Kial memadministrado? Ĉar la laboristoj prizorgu siajn proprajn aferojn. Ili ne plu estu peonoj sur kapitalista ŝaktabulo, sed posedantoj de la laborrimedoj. Memadministrado estas ĉefa elemento de la produktiveco. Koncernata, la laboristo partoprenu la funkciadon de sia firmao.

Kial socialaj bezonoj? Ĉar socialaj bezonoj (kiujn oni neniel konfuzu kun deziroj : laboristo povas bezoni veturilon por iri laborejon, samgrade kiel uzi siajn vestojn) devas esti atentigitaj, por decido koncerne valoron de la laborforto.

Kial kapitalismo estas morta laboro? Ĉar, samkiel vampiro kiu pluvivas nur elsuĉante vivan laboron, ju pli ĝi elsuĉas, des pli ĝia vivo estas gaja (la Kapitalo far *Karl Marx*), ĉar ĝi estas fonto de ekspluatado favore al malplimulto da posedantoj, da riĉuloj vorantaj la pli grandan kukopecon (la laboron), por lasi pecetojn (salajrojn, kiuj, distribuitaj inter salajruloj, nur estas malgrava parto de efektiva valoro de la laboro farita), ĉar tiu malplimulto suĉas sangon kaj ŝviton de laboristoj.

Kial klasbatalo? Ĉar historie, ekde tempo nememorebla, ĉiam ekzistas klasbatalo (klaso kontraŭ klaso), por hegemonio. Tiu batalo daŭrigos ĝis plena triumfo de laboristoj fariĝintaj mastrumantoj de la laboriloj.

Kial laborista klaso? Ĉar laboristoj senigitaj de laborrimedoj estas devigataj, per salajro, vendi siajn laborfortojn al kapitalistoj

deprenantaj la plusvaloron.

Kial ne klasa kunlaboro? Ĉar temas pri trompogilo, ĉar tiu vorto kamuflas senmezuran mistifikon por kredigi ke la interesoj de laboristoj identiĝas kun interesoj de kapitalistoj, pro falsaj sindikatoj uzurpantaj identecon kielsindikatoj, pro fidenuncistoj venditaj, semantaj dubon kaj timon. Efektive, temas pri laboristoj sin prostituantaj kiel veraj hetajroj de mastraro.

Kial klaskonscio? Ĉar ju pli laboristoj estos konsciaj pri tiuj problemoj, des pli ili estos potencaj kaj des pli venko de samrajtiga socio estos proksima.

Kial laboristaj konsilantaroj? Ĉar ili estos la konkretigo de memadministrado nepre necesa.

Kial, lastinstance, aliĝi sindikaton estas devo? Ĉar ni postulas laborkondiĉojn kaj vivon pli decajn.

Sindikatoj: Unuiĝo de laboristoj en la sama batalo.

Unuiĝo de tutmondaj laboristoj hastigos la finon de ekspluatado de homo far homo.

Laboristoj de ĉiuj landoj, unuiĝu !

Tiu teksto, verkita far Louis Gohin, aperis en la gazeto «l' Avenir syndical» en NovKaledonio de la CGT/ Nov/ Caledonie, tiam ano de la «Tutmonda sindikata Federacio» (FSM).

Enhavo

- 1 Kovrilpaĝo
 - 2 Flore kuiru!
SAT-Amikaro-emblemo
BildDeliraĵo: Ĉe la lago 62
 - 3 Kial...? Ĉar....!
 - 4-5 Statistikoj pri senlaboreco
 - 7 Pri la Kongreso :
Kiel atingi la kongresejon
 - 8 Bretona lingvo
Selle-humuraĵoj
- Supplément en français**
- 7 «Je suis citoyen du monde avant tout !»
 - 8-9 Ça bouge partout
 - 10 Un logo pour SAT-Amikaro
 - 11 Utilaj informoj
- Kiel traduki: Fin
 - 12 Libro-Servo
 - 13 Libro vivas pli ol unu sezono: Vivi sur barko
 - 14- Kongresanoj: unua listo.
 - 15 Esperantistoj aktivas
 - 16 La birdoj de la golfeto de San-Briego

Por esti kiel eble plej efika rilate la lastajn kongresajn informojn, ni sendos La Sagon 63 unu semajnon pli malfrue ol kutime.

Kongresaĵoj jam aĉeteblaj !

Ili aperas sur la kovrilpaĝo:

- Poŝtkartoj (0,50 €): du modeloj, «Saluton el Armor», kaj «Voyager plus léger» (Ĉi lasta aperas komplete ĉi sube, sed nur ties desegno kovrilpaĝe)

- Poŝtmarkoj (1,00 €, poŝta valoro 0,56 €): du modeloj vertikala kaj horizontala (ĉi lasta ne videbla kovrilpaĝe)

- Glumarkoj de la kongreso (10 glumarkoj kostas 1,50 €). Ne konfuzu ! Tiuj ne valoras por poŝte franki !

Mendu ilin ĉe:

OKK SAT-Amikaro 2010
ESPERANTO 22
Ĉe Alain LE MAU
9, rue St Aubin 22120 - YFFINIAC



Se vi deziras ilin ricevi tuj, aldonu a frankitan koverton sufiĉe grandan, kun via adreso. Se ne, vi trovos ilin en via kongresa teko.

Partoprenis en ĉi numero: (laŭ alfabeto ordo)

Andreo	Andrio
Marie-Pierre	G.
Véronique	Girard
Louis	Gohin
Bruno	Henry
Marie-Madeline	L.
Stéphane	Lemarchand
Ĵak	Le Puil
Franjo	Leveque
Alain	L.-M.
Flora	Markov
Vito	Markovo
Rolande	N.
Laurent	Peuch
Rolande	S.
Frederiko	Scibor
Jean	Selle
Sergo	Sir'
Amapola	Triguero

Statistiko pri senlaboreco kaj dungiteco: Kampo de politikaj manovroj (unua parto)

La uzado de la statistiko en la kadro de la politiko levas hodiaŭ almenaŭ tiom da demandoj, kiom da solvoj ĝi alportas. La nombrata taksado de la publikaj regmanieroj devus konsistigi demokratan progreson, sed la statistikaj produktoj fariĝis politika vetaĵo per si mem.

En socio superŝutata de mediatoj, la politikistoj, gazetistoj, «fakuloj» kun diversaj kompetentecoj kredas aŭ ŝajnas kredi, ke la nombroj estas evidentaĵoj. Samtempe nediskuteblaj kaj senesprimaj, la nombroj havas la celon anstataŭi argumentadon. Nombro estas simpla kaj estigas la impreson aŭ pli precize la iluzion, ke oni komprenas kaj primajstras tion, pri kio oni parolas.

Statistikoj neniam perfekte prezentas realon, sed ili devus esti prezento de ĉi-tiu lasta kun vera zorgo pri scienca rigoreco, dum ili estas pli kaj pli hipokrite kaj mallerte uzataj de politikistoj.

Siatempo la franca registaro havis la celon redukti la kvanton da senlaboreco al 5 procentoj por la jaro 2012. Kvankam tiu celo rapide kadukiĝis pro diversaj kaŭzoj, estis tamen necese, ke la registara komunikado aperigu statistikojn konformajn al la esperata evoluado, des pli, ke opiniondoj de longe montris, ke la senlaboreco estas unu el la ĉefaj maltrankviligoj de la loĝantaro.

En majo 2005, la nova ĉefministro *Dominique de Villepin* decidis, ke la redukto de la senlaboreco estos la ĉefa celo de lia ekonomia politiko. Taktike, tiu celo havigis al li la okazon pravigi malrigidigon de la rajto pri la laboro de longe petata de la mastraro koncerne la regulojn por maldungoj. Fakte, laŭ la opinio de iuj liberalaj ekonomikistoj faciligoj donitaj al la dungantoj, por maldungi, ebligis pli vastan dungadon: ju pli facile la mastroj povus maldungi, des pli facile ili dungus...

Laŭ tiu koncepto kreiĝis la novdungaj kontraktoj (franclingve *contrats nouvelles embauches - CNE*), por doni al la entreprenistoj la eblon maldungi, sen esti devigataj motivi sian decidon dum la du unuaj jaroj de labora interkonsento.

Krom tio, koncerne la dungitecon la registaro nepre provis la mediatojn per avantaĝaj nombroj, eĉ falsaj, kiu flatus ĝian politikan agadon. Por

certigi favorajn anoncojn, la direktoroj de tri el la kvin ĉefaj institucioj, kiuj ellaboras kaj publikigas statistikojn pri la dungiteco kaj senlaboreco, estis abrupte anstataŭigitaj per subtenantoj de la regpovo, kiuj antaŭe plenumis oficojn sub la estreco de ministroj. Tiuj ŝanĝoj concernis la Nacian Oficon por Dungiteco (franclingve *Agence nationale pour l'emploi - ANPE*) en aprilo 2005, la Centran Oficon de la Organoj de la Sociala Asekuro (franclingve *Agence centrale des organismes de sécurité sociale - ACOSS*) en junio 2005, la Direkcion por la Impulsado de Esplorado, Studado kaj Statistiko (franclingve *Direction de l'animation de la recherche, des études et des statistiques - DARES*), kiu estas la statistika servo de la ministro pri Laboro, en la aŭtuno 2005. Nur la direktoroj de la Nacia Instituto de Statistiko kaj ekonomikaj Esploroj (franclingve *Institut national de la statistique et des études économiques - INSE*) kaj de la Nacia Unuiĝo por la Industria kaj Komerca Dungiteco (franclingve *Union nationale pour l'emploi dans l'industrie et le commerce - UNEDIC*) provizore savis sian postenon, sed konsciis la nestabilecon de sia situacio.

La statistikoj pri la dungiteco kaj senlaboreco baziĝas sur enketaj kaj administraciaj donitaĵoj. La enketaj donitaĵoj rezultas el sondadoj. Pro kostoj, la muestroj havas limigitan grandecon. La administraciaj donitaĵoj estas kompletaj kaj ebligas publikigi detalajn indikaĵojn sur la kampo de geografiaj lokoj aŭ ekonomiaj sektoroj. Tamen ili ne ebligas ekzakte nombriton, kion oni deziras, en diferenco de enketaj demandaroj. Ekzemple, dungopetanto registrita ĉe la Nacia Ofico por Dungiteco ne nepre estas senlaborulo laŭ la difinoj internacie adoptitaj.

La statistikoj pri la senlaboreco fontas el tri tipoj de donitaĵoj: - ĉiujara nombrado de la senlaboruloj konforme al la internaciaj kriterioj; - ĉiumonata nombrado de la dungopetantoj registritaj ĉe la Nacia Ofico por Dungiteco, kaj kies nombroj reliefe aperas ĉe la mediatoj en la fino de monato; - ĉiumonata provizora taksado de la senlaboreca procento laŭ la statistikoj ellaboritaj de la Nacia Ofico por Dungiteco En oktobro 2008, la Nacia Ofico por Dungiteco kunfandiĝis kun la Asocio por la Industria kaj Komerca Dungiteco (franclingve

Association pour l'emploi dans l'industrie et le commerce - Assedic), por formi novan strukturon tiel nomatan Centro de Dungiteco (franclingve *Pôle Emploi*).

Por nombri la senlaborulojn, la statistikistoj kutime uzas kriteriojn, kiujn harmoniigis la Internacia Buroo pri Laboro (franclingve *Bureau international du travail - BIT*), por fari komparojn inter diversaj landoj kaj inter diversaj jararoj. Senlaborulo estas persono, kiu deklaras, ke ĝi ne havis pagatan okupon, eĉ unuhoran, dum la semajno antaŭa al la okazanta enketo, kaj estas preta labori almenaŭ post 15 tagoj. La koncerna harmoniigo ne estas perfekta: rilate Francion la Eŭropa Statistika Ofico nomata *Eurostat* ne rigardas renovigon de registrado ĉe la Nacia Ofico por Dungiteco kiel dungopeton, dum la Nacia Instituto de Statistiko kaj Ekonomikaj Esploroj akceptis tian enskribiĝon ĝis la jaro 2007.

La enketaj demandaroj pri dungiteco ebligas nombri la senlaborulojn. La taksado de la dungiteco rilatas al la nombro da laborantaj personoj, ne al tiu de la laborpostenoj en la entreprenoj, ĉar unu laboranta persono povas okupi plurajn laborpostenojn. La senlaboreca procento estas la rilatumo inter la nombro da senlaboruloj kaj la tuto de la personoj troviĝantaj sur la labormerkato, laborantaj aŭ ne. La enketaj demandaroj pri dungiteco liveras la plej fidindan taksadon de la senlaboreco, sed iliaj rezultoj estas publikigitaj nur unufoje en jaro, nur en marto post la koncerna tempodaŭro.

La administraciaj donitaĵoj produktataj de la Nacia Ofico por Dungiteco estas rapide disponeblaj, sed ili enhavas informojn nur pri dungopetantoj nombritaj en la fino de la monato. Iuj dungopetantoj etlaboras, kvankam ili estas registritaj ĉe la Nacia Ofico por Dungiteco; inverse, pro personaj kialoj iuj senlaboruloj ne registriĝas ĉe la koncerna ofico.

En la metropolo, la dungopetantoj nombritaj en la fino de monato estas dispartigataj en ses ĉefajn kategoriojn laŭ la tipo de dungiĝo, kiun ili deziras, kaj la etlaborojn, kiujn ili havis dum la koncerna monato. En la fino de ĉiu monato, mediatoj kaj publika diskutado direktas la atenton nur al la kategorio «Plena senlimtempa dungiteco», kiu datiĝas de la malproksima epoko, kiam la koncerna dungiteco estis la normo.

La malfacilaĵo de la labormerkato kaj la disvolviĝo de la instigoj al partatempaj laboroj kaj mallongatempaj laborkontraktoj ne dubigis pri la taŭgeco de la referenca kategorio «Plena senlimtempa dungiteco», kio falsas la percepton pri la realaĵoj. Se oni konsideras la dungopetantojn de la transmaraj departementoj kaj la maljunajn laboristojn nedevigatajn serĉi dungon, kiuj ne estas enkalkulataj inter la dungopetantoj nombritaj en la fino de monato, la kategorio «Plena senlimtempa dungiteco» - oficiala statistiko reliefigata de la ministro pri Laboro ĉiun monaton - entenas malpli ol unu el du dungopetantoj.

En la printempo 2005, kiam nova direktoro de la Nacia Ofico por Dungiteco ekplenumis sian funkcion, de post pluraj monatoj la situacio de la labormerkato estis malbona: la procento de la senlaboreco superis la nombron de dek Dum nova registaro formiĝis, neniuj ekonomikistoj prognozis rapidan pliboniĝon de la labormerkato.

Du tagojn antaŭ la referendumo pri la eŭropa konstitucio, nome la 27-an de majo 2005, ĵurnalisto profitis de oportuna malapero de sekretaj dokumentoj pli malpli aranĝitaj de altaj instancoj, kaj publikigis en la gazeto *Le Parisien* artikolon, por anonci, kvar tagojn antaŭ la oficiala dato de diskonigo, ke la dungopetantoj malpliigis en la nombro de 0,056 procento, kio respondis al 1400 personoj. Tiu eta malpliigo sufiĉis, por ke la koncerna ĵurnalisto diru pri gravega inversiĝo de evoluo. Fakte, tio senklarige antaŭsciigis pri diskreta nova maniero trakti la liston de la dungopetantoj. Tiu ennovaĵo havis la avantaĝojn doni eblon eksterigi iujn dungopetantojn el la kategorio uzataj, por ellabori la oficialajn statistikojn pri la senlaboreco, kaj loki ilin en aliaj kategorioj, kiuj ne estas enkalkulataj: ekzemple malsanoj, staĝoj aŭ profesia instruado. De post la jaro 2005, la dungopetantoj havas malpli da tempo, por ĉiu monate reguligi sian situacion ĉe la Asocio por Industria kaj Komerca Dungiteco, kaj tiel povas elstrekigi el la listoj pro «foresto okaze de kontrolo». Jam en la jaro 2005 la oficiala referenco pri la nombro da dungopetantoj indikis malprogreson en la nombro de 20000 - 30000 ĉiunmonate. Tiam fetiĉismo al la nombroj trafis la prezidenton, la ĉefministron kaj aliajn ministrojn, kiuj urĝis sin laŭ politika oportuno, por anonci antaŭ la dato de oficiala publikigo la lastan malgrandiĝon de la nombro de la senlaboruloj.

(daŭrigota)
Jean Selle

Noto.

La elementoj de tiu artikolo fontas el la enhavo de la 2-a ĉapitro de la libro titolita *Le grand truquage*, verkita de kolektivo da statistikistoj sub la pseŭdonimo *Lorraine Data*, eldonita de la firmao *La Découverte* en majo 2009.

Neforgeseblan rendevuon je la 3-6a de aprilo 2010

Baldaŭ okazos la 65a kongreso de SAT-Amikaro
en Hiliono 22 (apud San-Briego).

Kune ni diskutos pri eblaj rimedoj por krizkontraŭi. Ni paŝos en la paŝoj de loka verkisto Louis Guilloux alnomita «la nesubigito». La aktualajn problemojn pri akvo-kvalito en Bretonio kaj aliloke, la estontecon de la abeloj, la ekonomi-sociajn krizojn kune ni debatos.

Krizkontraŭi estas ankaŭ kune amuziĝi: pro tio, ni al vi instruos bretonajn dancojn. Valoran artprogramon ni antaŭvidis: klasika gitarkonzerto, muzika teatro, Ĝenerala Kanto kun la koruso Interkant' kaj prezento de Gijomo, pianisto kaj kantisto.

Plenigu vian aliĝilon, baldaŭ estos novaj tarifoj post la 1a de marto 2010.

Por trovi utilajn informojn vizitu nian retpaĝaron:

<http://kongreso2010.sat-amikaro.org>

Speciala prikongresa numero «La Sago 60».

Kiel atingi la kongresejon «Georges Palante» en Hiliono

2, rue Ollivier Provost 22120 - HILLION

Trajne:

Atingu la stacidomon de San-Briego.

Bonvolu anonci vian alvenhoron kaj reir-horon ĉe la stacidomo de San-Briego plenigante laŭcelan parton de via aliĝilo; kunveturado povus esti organizata.

Alia ebleco de la stacidomo de San-Briego: buse per «TUB» ĝis Hiliono.

10 min. piede, elirante la stacidomon, dekstreniru laŭ la bulvaro «Charner» ĝis rondoplaco de la bulvaro «Clemenceau», maldekstreniru al centro de la urbo, ĉe la fino de la bulvaro, dekstren situas busstacidomo TUB (Transportoj Urbaj San-Briegaj).

Uzu linion 60 «gare urbaine – Hillion centre»

Busbileto prezo: 1€

Busbiletaro de 10 biletoj prezo: 8,70€ (validas 1h)

www.tubinfo.fr

Aŭte:

De la urbo RENNES:

N136 **ROCADE NORD** – LORIENT – BREST – SAINT-MALO (15 km proksimume)

N12 SAINT-BRIEUC - BREST – PACE

Daŭrigi: N12 / E50 (80 km proksimume)

Eliru rapidan vojjon uzante: SAINT-RENÉ - GARE D'YFFINIAC – HILLION

Je trafikcirklo uzu la 2an elirejon - Daŭrigi: **D81** al HILLION

Sekvu vojindikilojn HILLION – (proksimume 6 km) eniri HILLION –

«l'espace Georges Palante» estas indikita je via maldekstra flanko tuj post via alveno ĉe la centro de la urbeto «HILLION» post dekstra ĝirejo.

Ŝipe aŭ naĝe:

Nepre kalkulu kun la tajdhoraro por atingi la ŝiphavenon de San-Briego «Le Légué» aŭ elektu grundadon ĉe strando de Hiliono.

Kaze de problemoj, bonvolu ne alvoki «SNSM aŭ CROS» sed alvoku poŝ-telefonojn:

- Philippe 06 76 29 90 11

- Laurent 06 31 57 84 44

- Alain 06 76 46 89 29

- Franjo 06 76 27 51 78



Bretona lingvo

La bretona lingvo, ankoraŭ nuntempe parolata en la okcidenta parto de la bretona duon-insulo, estas aŭtenta lingvo. Ĝi devenas de kelta branĉeto hindo-eŭropa.

Ekde la alveno de la britaj elmigrintoj, forpelitaj el sia insulo dum la grandaj invadoj, la bretona lingvo evoluis dum dek-kvin jarcentoj.

Jules Ferry kaj ĉefe la 3-a respubliko, malpermesis la bretonan lingvon en la lernejoj. Sed, la katokila eklezio uzis ĝin ĝis la dua mondmilito.

Komence de la 20-a jarcento, tri kvaronoj de la regiona popolo parolis nur bretone.

Nuntempe, nur 240 000 bretonoj estas dulingvaj.

Kiel en esperanto: la akcento ofte estas sur la antaŭlasta silabo de la vortoj.

la principo estas: po unu sono letere la litero «e» neniam estas muta kaj neniam portas supersignon.

Tamen la bretona lingvo prezentas mirindan apartecon: la komenca litero de la vortoj dependas de la antaŭa vorto; do, unu vorto havas plurajn ortografiojn! Ekzemple: la patro = *an tad* – mia patro = *ma zad* – via patro = *da dad*

Vorprovizeto

Aber, aven = estuaro
 amann = butero
 Ankou = morto
 Aod (aot) = marbordo
 Argoat, argoed (argoa, argoet) = arbara regiono
 Arvor (armor) = marbordo
 Bara = pano
 Bihan (bian) = malgranda (Morbihan =

malgranda maro)
 Bras (braz) = granda (Mor braz = oceano)
 Breizh = Bretonio (el «breiz» iĝis rondinsigno BZH, kiun oni vidas sur multaj aŭtoj – Mor Breiz = Manika maro).

Du = nigra
 Enez (inis) insulo
 Fest-deiz = taga festo
 Fest-noz = nokta festo
 Gwenn (guen) = blanka
 Gwin = vino (Gwin ru = ruĝa vino)
 Gwenn-ha-Du = nomo de la bretona flago
 Kastel = kastelo
 Ker = urbo, vilaĝo, vilaĝeto
 Kozh = maljuna
 Marc'h = ĉevalo
 Men = ŝtono
 Menez (mene, mane, mine) = monto
 Mor = mer
 Nevez = nova
 Palud = marĉo
 Pen = kapo, fino (Penn ar Bed = Finistère aŭ fino de la tero)
 Roc'h = roko
 Ty (ti) = domo

La nombroj:

0 = null; 1 = unan; 2 = daou aŭ div;
 3 = tre aŭ ter; 4 = pevar aŭ peder; 5 = pemp; 6 = c'hwec'h; 7 = seizh; 8 = eizh; 9 = nav; 10 = dek


La ĝentileco:

Demat! = Bonan tagon!
 Nozvat! = Bonan nokton!
 Penaos emañkont? = Kiel vi fartas?
 Degemer mat, Digemer mad! = bonvenon!
 Mat mutacias je vat! = Bonne

chance!
 Mar plij ganit = Mi petas!
 Trugarez = Dankon!
 Netra' bet! = Ne dankinde!
 Bloavezh mat! = bonan jaron!
 Yec' hed mat! = je via sano!
 Chistr (sistr) = cidro
 Krampouez = krespoj

Kenavo ar wech all / Ĝis revido!

Franjo



Emeriteco nur ekde la aĝo de 70 jaroj povus esti oportuna.



Unu el la manieroj uzi interreton.



Selle humuraĵoj

Espéranto: vers une culture sociale sans frontières

débat sur l'identité nationale *Etre ou ne pas être français, jour 5*

Jean-Jacques:

«Je suis Citoyen du Monde avant tout!»

♦ *dijOnscOpe.com* publie le 06 novembre dans le cadre du débat sur l'identité nationale une interview d'un espérantiste intitulée **Jean-Jacques: «Je suis Citoyen du Monde avant tout!»**.



Et si l'on débattait des droits humains plutôt que de l'identité nationale? Pour Jean-Jacques, cela serait plus approprié. Comme un certain nombre d'êtres humains, ce Dijonnais est Citoyen du Monde. Pour lui, l'Homme se définit avant tout par son appartenance au genre humain. Dans cette même optique, Jean-Jacques milite dans de nombreuses associations et parle couramment l'espéranto, le langage universel de la paix...

«Ce qui compte c'est l'être humain»

«Pour moi, l'identité nationale n'est pas fondamentale; ce qui compte, c'est l'être humain. C'est normal que chacun soit attaché à son pays mais le fait d'être un Citoyen du Monde me paraît plus important. Je suis Français de parents Français, je tiens à ma terre natale mais je n'en fais pas quelque chose de fondamental. Le nationalisme et le patriotisme, on l'a vu au cours

de l'histoire et on continue à le voir, conduisent souvent à des guerres. Selon moi, les raisons du débat sur l'identité nationale sont purement françaises: le gouvernement y voit un thème porteur. Il l'utilise pour attirer de nouveaux électeurs. J'ai une carte de Citoyen du Monde depuis plus de 20 ans; ce mouvement a été créé après la deuxième guerre mondiale. Il est surtout symbolique.

Un langage pour la paix

Je parle aussi couramment l'Espéranto. J'ai appris cette langue en raison de idées qu'elle propageait. Cette conception d'une langue mondiale qui permettrait à chacun de se comprendre et d'échanger afin d'éviter des guerres m'a attiré. J'ai pris des cours d'espéranto en 1990 et maintenant j'en donne moi-même à Dijon. J'ai même quelques diplômes! Chaque année, un congrès international réunit des milliers de personnes. Je suis allé à celui de Montpellier en 1998. Tout le monde parlait cette langue. C'est le langage le plus facile à comprendre et à apprendre. Il est bien plus simple que l'anglais. D'ailleurs je ne parle aucune autre langue.

Agir à son échelle

Hormis cela, je fais aussi partie de nombreuses associations humanitaires: Amnesty International, Artisans du Monde ou encore le Mouvement pour une Alternative Non-violente. Certaines choses dans le monde sont totalement inacceptables! A mon humble échelle, j'essaie d'agir. J'aime me comparer à cette petite histoire racontée par l'écrivain Pierre Rabhi: alors qu'un incendie dévastait une forêt, un colibri faisait des allers-retours pour déposer avec son bec des gouttes d'eau sur les flammes. Le renard interpella l'oiseau: «Mais enfin! Cela ne sert pas à grand-

chose ce que tu fais! ». Le colibri lui répondit: «Et bien moi, je fais ma part. «Comme le colibri, je fais ma part. Si tout le monde faisait de même, le monde irait peut-être mieux. La France se dit le pays des droits de l'homme mais parfois elle en est loin. L'expulsion d'une vingtaine de Géorgiens à Marsannay-la-Côte vers la Pologne cette semaine le montre bien [voir lien ci-dessous].



A quand un débat sur les droits humains?

Ce sont les hommes politiques qui ont lancé le débat sur l'identité nationale qui mènent ces politiques migratoires. Un débat sur les droits humains me paraîtrait plus important. J'aimerais que le premier article de la constitution française stipule que les droits humains passent avant tout et notamment, avant les intérêts financiers. Il n'est pas interdit de rêver; à certaines époques certaines choses qui nous paraissent normales aujourd'hui étaient alors utopiques...»

Source: <http://www.dijonscope.com/001611-jean-jacques-citoyen-du-monde-avant-tout>

- ♦ *Ouest-France* publie le 28 décembre un article intitulé **Ils parlent l'espéranto, la langue équitable.**



Ils parlent l'espéranto, la langue équitable

Yvonne et Bruno Robineau chez un couple de Coréens en habit traditionnel. «Ils ne parlaient pas anglais, encore moins français. L'espéranto nous a permis de communiquer.» DR

Quand ils parlent de l'espéranto, Yvonne et Bruno Robineau disent «*la langue équitable*»... Comme le café, ou le commerce? Eh oui! «*C'est une 'langue-pont' qui met sur un pied d'égalité des gens de langues maternelles différentes*», plaide Yvonne.

Voilà près de vingt-cinq ans que le couple a découvert l'espéranto, au début d'un voyage au long cours autour du monde, qu'ils racontent dans Huit ans autour du monde. Avant de se lancer dans cette aventure, tous deux parlaient très bien anglais et espagnol. OK pour l'Irlande ou l'Amérique latine mais très insuffisant pour la Hongrie, le Japon ou la Chine.

Dès leur troisième étape, en Bulgarie, ils décident de se mettre à l'espéranto.

- ♦ *Ouest-France* publie le 09 janvier un article intitulé **Les chanteurs de Tikhvine ont conquis les enfants de Freinet** sur un concert en russe et en espéranto qui a eu lieu à Hérouville-Saint-Clair (14).

Les chanteurs de Tikhvine ont conquis les enfants de Freinet - Hérouville-Saint-Clair

samedi 09 janvier 2010

Les chanteurs de Tikhvine ont donné un concert en russe et en esperanto aux élèves de primaire de l'école Freinet. Ils se produiront également vendredi soir au Café des Images.

Le hall de l'école Freinet s'est transformé, jeudi après-midi, en salle de concert.



«*Trente-cinq jours de stage, raconte Bruno. C'était intensif mais ça nous a permis d'avoïr un bon niveau en peu de temps. Et six mois plus tard, nous parlions couramment.*»

«*Ce n'est pas qu'une langue, poursuit Yvonne. C'est aussi une communauté. Dans tous les pays, nous avons pu compter sur les espérantistes, souvent différents mais animés d'un idéal commun: rencontrer l'autre.*»

Hébergés chez des espérantistes

Exemple concret au Japon: «*Nous avons vécu chez deux espérantistes: un ingénieur de Toyota et un petit agriculteur, tous deux trouvés grâce au pasporta servo, réseau international d'hébergement gratuit dans des familles à la condition de parler espéranto.*» Au total, durant ces huit années de pérégrinations, les Robineau ont séjourné dans 22 familles[1] grâce au pasporta servo. Depuis, ils continuent à parler espéranto. Et s'ils voyagent moins, ils reçoivent dans leur village du Maine-et-Loire des dizaines de visiteurs étrangers. «*Je me considère comme un ambassadeur de cette langue*», explique Bruno. «*L'espéranto, ce n'est pas un hobby mais un outil. Un outil de citoyens du monde.*»

Alain GUYOT.

Source: http://www.ouest-france.fr/actu/actuDet_Ils-parlent-l-esperanto-la-langue-equitable-_3639-1206792_actu.Htm

[1] Correctif de Maryvonne et Bruno Robineau: «*Evidemment nous avons séjourné dans beaucoup plus de familles au cours des 8 années de voyage. Ce chiffre de 22 familles ne concerne que notre séjour au Japon!*»

Et l'ambiance était au rendez-vous! Les élèves du primaire ont fait un accueil plus que chaleureux au trio qui leur a interprété des chansons en russe et en esperanto. «**Nous avons proposé notre action à plusieurs écoles, mais comme**

je suis un ancien instituteur de l'école Freinet, Michel, le directeur a tout de suite répondu favorablement», explique Gérard Sénéc, président de l'association « Hérouville Esperanto». En effet, la venue des musiciens a été l'occasion de

faire découvrir aux enfants l'existence de cette langue universelle, inventée de toutes pièces et parlée par des millions de locuteurs dans le monde. «**Je leur ai expliqué ce qu'est cette langue et les élèves ont exprimé une grande**

- ♦ *Ouest-France* publie le 07 janvier un article intitulé **Une soirée russe au Café des images vendredi soir** sur une soirée russe organisée par l'association «Hérouville Espéranto».

Une soirée russe au Café des images vendredi soir - Hérouville-Saint-Clair jeudi 07 janvier 2010

Les membres de l'association « Hérouville Espéranto » ont reçu les chanteurs de Tikhvine qui feront un concert à la soirée russe au Café des images, lors de leur rendez-vous hebdomadaire à la Maison des associations.



Pour bien commencer l'année, le Café des images propose, en collaboration avec l'association «Hérouville Espéranto», une soirée bien remplie, vendredi prochain. Au programme, un repas russe à 19 h (malheureusement déjà complet) suivi d'une projection du film de Guennadi Sidorov «Les Petites vieilles» (Grand prix au Festival d'Angers) et enfin un concert avec des chanteurs russes de Tikhvine.

On peut se demander quel est le rapport avec l'Espéranto, cette langue universelle créée au XIX e siècle pour permettre la communication entre les peuples sans suprématie d'une langue sur une autre. C'est tout simplement que les chanteurs de Tikhvine

surprise», rapporte Martine Legay, institutrice en CP-CE1.

Après le concert, lors d'un échange dans la classe, ils ont pu dire qu'ils avaient aimé. Ils ont également remarqué que dans esperanto il y a «**le mot espoir**». En les questionnant sur ce que les créateurs d'une telle langue pouvaient bien espérer, les réponses ont fusé: «**Ils espèrent être connus**», dit Léo. «**Ils espèrent bien chanter**», lance Nour. Enzo pense, lui, que l'espoir c'est que «**leur langue marche bien et qu'on pourra tous se comprendre**». En attendant, rendez-vous au Café des Images vendredi soir pour un concert à 22 h 45.

Source: http://www.ouest-france.fr/actu/actuLocale_Les-chanteurs-de-Tikhvine-ont-conquis-les-enfants-de-Freinet-_14167-avd-20100109-57453178_actuLocale.Htm

Voir aussi: [Quest-France - 07 janvier 2010 - Une soirée russe au Café des images vendredi soir - Hérouville-Saint-Clair](#)

sont des «espérantistes» convaincus. Notamment Mikaelo Bronstein, écrivain, chanteur, compositeur qui travaille avec l'association herouvillaise depuis 1991.

Mardi soir, lors du rendez-vous hebdomadaire du groupe pour enseigner et échanger autour de

l'Espéranto, les membres de l'association ont rencontré leurs hôtes pour une soirée conviviale

avec chansons en avant-première, apéritif et repas chaleureux. «**Nous faisons beaucoup d'échanges dans le monde avec des Espérantistes, nous sommes allés par exemple au Japon, en Russie, en Australie et nous avons reçu des Chinois, des Népalais... Nous échangeons et nous nous offrons le gîte et le couvert**», explique Gérard Sénécal, le président de l'association.

Source: http://www.ouest-france.fr/actu/actuLocale_-Une-soiree-russe-au-Cafe-des-images-vendredi-soir-_14327-avd-20100107-57442212_actuLocale.Htm

Voir aussi: [Ouest-France - 09 janvier 2010 - Les chanteurs de Tikhvine ont conquis les enfants de Freinet - Hérouville-Saint-Clair](#)

Agenda:

♦ mardi 09/03 de 19h15 à 21h15: conférence de Dominique Siméone, président de SAT-Amikaro, à l'Institut d'Etudes Politique, Salle C931, 9 rue de la Chaise, Paris 7e (Métro Sèvres Babylone ou Rue du Bac). Au programme: présentation de l'espéranto et du mouvement SAT puis débat.

♦ Les *Dernières Nouvelles d'Alsaces* du 24 décembre publient un article intitulé **Rencontre annuelle des espérantistes**.

Colmar Voisinage / Fribourg-en-Brigau



Rencontre annuelle des espérantistes

Une délégation d'espérantophones de Mulhouse, Colmar et Village-Neuf, ainsi

♦ *La Nouvelle République* publie le 18 décembre un article sur le tour du monde de deux écologistes qui ont appris l'espéranto pendant six mois avant de partir et qui s'en servent pendant leur périple pour, entre autres, se loger chez l'habitant.

Alice et Cédric s'exposent sur les murs de l'Indre

C'est en Chine qu'Alice et Cédric ont posé leurs valises depuis un mois.

Une exposition est née de leur tour du monde à vélo couché. L'Association espérantiste de l'Indre s'en est fait le porte-parole.

Ils sont actuellement en Chine. Et ils vont bien. Alice et Cédric, ces deux Berrichons partis il y a plus d'un an, à vélo couché, pour un tour du monde qui se veut écologique et militant, donnent régulièrement des nouvelles à leurs proches, via leur blog (lire par ailleurs) ou passent directement par Maryvonne Houviez, présidente de l'Association espérantiste de l'Indre. Maryvonne? Une femme dynamique qui ne ménage pas ses efforts pour soutenir les deux jeunes gens. Il faut dire que ces derniers sont partis en voyage avec un bagage dont elle peut être fière: leur petit dictionnaire d'espéranto. Une langue qu'ils ont apprise en six mois, et grâce à laquelle ils peuvent être hébergés un peu partout dans le monde, au fil de leur périple.

«*Le réseau espérantiste leur permet de se loger et d'éviter nombre de tracas, note Maryvonne Houviez. En cas de problème, pouvoir communiquer est essentiel.*»

Porte-parole de l'espéranto, Alice et Cédric le sont également des valeurs écologiques et humaines qu'ils essaient de véhiculer. Alors, toutes leurs rencontres, toutes leurs initiatives, ils ont décidé d'en faire une

que des espérantophones suisses, ont participé samedi 19 décembre à Fribourg-en-Brigau à la traditionnelle rencontre trinationale en l'honneur de l'initiateur de la langue internationale, le docteur Zamenhof, dont on a fêté le 150e anniversaire.

Malgré le froid vif, les premiers arrivants ont visité le marché de Noël, mais ils sont vite venus se réchauffer autour d'un «kafo kaj kuko» au «Treffpunkt» du groupe local où ils ont assisté à une série de conférences en espéranto sur le développement de la langue internationale dans le monde. Edmond Ludwig, président d'Espéranto France-

exposition, élaborée par Maryvonne Houviez, qui retrace leur parcours, via des images et un film.

Récemment, l'expo était installée à la Maison pour tous de Vaugirard. Une conférence était même au menu.

En conférence à Hanoi

«*Alice et Cédric ont tenu une conférence, le mois dernier, à Hanoi*, explique Maryvonne Houviez. *Nous la reprenons pour expliquer aux gens ce qu'ils font et ce qu'ils vivent.*» Chaque diapositive montrée au public est, qui plus est, sous-titrée en espéranto!

Le tour du monde des deux Berrichons devrait prendre fin en décembre 2010. Là, ils pourront, eux-mêmes, faire état de ce qu'ils ont vécu. En français, ou en espéranto!

Christophe Gervais

L'exposition bientôt à Déols

L'exposition itinérante sur Alice et Cédric, si elle est supportée par l'association d'espéranto, l'est tout autant par Portrait de Planète, l'association créée par les deux jeunes gens. Par son biais, ils souhaitent alerter l'opinion sur le mauvais traitement infligé à l'environnement.

Pour en savoir plus, vous pouvez donc vous rendre sur le blog d'Alice et Cédric (<http://portraitdeplanete.blogg.org/>) ou attendre la prochaine exposition, qui se tiendra à la bibliothèque de Déols, du 5 janvier au 20 février.

Contact: Maryvonne Houviez, tél. 06.78.90.92.17.

Source: <http://www.lanouvellerepublique.fr/dossiers/journal/index.php?dep=36&num=1484789>

Ça bouge partout...

Est, a parlé du cours d'espéranto à la faculté des lettres, langues et sciences humaines de Mulhouse et a exposé les grandes lignes du projet de site Internet ...

Site Internet: <http://mulhouse.esperanto.free.fr/>

Source: <http://www.dna.fr/articles/200912/24/rencontre-annuelle-des-esperantistes,colmar,000013586.php>

Concours: un logo pour SAT-Amikaro

Dans son numéro 57, La Sago annonçait l'ouverture d'un concours organisé par le Comité pour donner un logo à SAT-Amikaro, les propositions devant être envoyées à sat-amikaro@wanadoo.fr, publiées tous les mois dans La Sago ainsi que sur le site Internet de l'association (www.esperanto-sat.info). Le concours est ouvert à tous, membres de l'association ou non.

Un débat aura lieu dans les colonnes de La Sago concernant les propositions retenues par le Comité. Le choix du logo s'effectuera par vote lors du prochain congrès de l'association (Pâques 2010).

Une série de cinq propositions d'un auteur A, et une variante de la proposition 5 de A, par un auteur B ont été publiées dans La Sago 57. Une série supplémentaire est publiée dans ce numéro, dont les versions en couleur sont éditées en page 2.

Les propositions sont volontairement anonymes et les explications données par les auteurs ne sont pas publiées, ceci afin de ne pas influencer: rappelons qu'un bon logo doit parler de lui-même et ne pas avoir besoin d'explications. Toutefois, il semble nécessaire de préciser que

- pour la série D, les variations D1a, D1b, D1c (voir en page couleur) sont valables aussi bien pour D1 que pour D2, bien que non dessinées pour D2;

- la proposition F en fait n'est pas une nouveauté, on la trouve dans une très ancienne affiche rééditée récemment

en carte postale par la Coopérative d'édition de SAT. Ce logo n'a jamais été officiel, mais nous le pensons digne de figurer au concours, d'autant qu'il a inspiré une variante FB.

D'autres propositions peuvent encore être envoyées, et ce jusqu'au congrès (par courrier au siège, ou par net à l'adresse indiquée plus haut)

A vos plumes et/ou pincesaux !

Le Comité de SAT-Amikaro
avec l'aide de Frédéric Scibor



C



D1



D2



FB



E



G

Renseignements utiles

Permanence au siège

Lundi	18h30 - 19h30
Mardi	10h00 - 16h00
Mercredi	14h30 - 18h00
Judi	15h30 - 18h30
Vendredi	09h30 - 19h30
Samedi	11h00 - 18h00

Cours oraux au siège – pour débutants:

- Les lundis** 17H30 avec Georges Meilhac
- Les mercredis** 14H30 avec Hélène Bonjour.
- Les samedis** 14H00 avec Vincent Charlot

Cours par correspondance d'espéranto : inscription directe auprès de :

C. Gerlat 11 bd M-al Leclerc 38000 Grenoble 0476 01 91 71 claud.gerlat@orange.fr

Retrouvez toute la liste des cours d'espéranto sur le site de SAT-Amikaro, rubrique «Cours d'espéranto»: <http://esperanto-sat.info/rubrique97.html>

Cette rubrique tente de référencer un maximum de cours d'espéranto se déroulant en francophonie. Pour toute mise à jour ou cours manquant, nous contacter.

Service Librairie par correspondance pour les adhérents (catalogue sur demande)

Au siège; Net: libroservo@sat-amikaro.org

Contributions pour ce supplément à envoyer :

- de préférence par internet, à lasago@free.fr, en format RTF ou TXT pour un document joint, ou directement dans le corps même du message, et en format TIFF, JPEG ou GIF pour les images.
- éventuellement sur papier par poste, les textes devant impérativement être typographiés (machine ou imprimante) sans ratures ni surcharges pour un traitement au scanner (les erreurs éventuelles sont à indiquer dans la marge) à envoyer à: **Serge SIRE, La SAGO 85 impasse des Fées 74330 Sillingy**

Renseignements sur l'espéranto:

- FRANCE : SAT-amikaro 132/134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris
- BELGIQUE : Claude Gladys, Rue du Culot, 1; B-5630 Cerfontaine
- SUISSE : Mireille Grosjean, Grand-rue 9, CH-2416 Les Brenets.

LA SAGO. CPPAP n° 0307 G 86224.

ISSN: 1763-1319.

Directeur de la Publication : Guy Cavalier.

Impr. TROISA, 91480 Quincy-sous-Senart.

Dépot légal à parution.

LA SAGO - Février 2010.

Espéranto

vers une culture sociale sans frontières

Utilaj informoj

Sidejo:	Lunde	18h30 - 19h30
deĵor-	Marde	10h00 - 16h00
horoj	Merkrede	14h30 - 18h00
	ĵaŭde	15h30 - 18h30
	Vendrede	09h30 - 19h30
	Sabate	11h00 - 18h00

■ Kursoj.

Por la unua grado, vidu lastan paĝon de la franclingva suplemento.

Ĉe la sidejo:

Parolaj perfektigaj kursoj dua grado : ĉiun merkredon, je la 16a, kun Phil Guichet, ĉiun ĵaŭdon, je la 15a, kun Élisabeth Barbay, kaj ĉiun vendredon je la 17a kaj duono, kun Vito Markovo.

Trigrado: ĉiun sabaton, je la 16a kun Vincent Charlot.

La Babilrondo de SAT-Amikaro okazas ĉiun duan merkredon de la monato, je la 11h45 gxis 14h30 kun Thérèse Pinet.

■ **Perkorespondaj kursoj, dua kaj tria grado:** Claude Gerlat

38 €. (senlaboruloj kaj ĝis25jaraĝaj junuloj : 19 €.) Ĉeko profite al SAT-Amikaro.

Pedagogio: Mireille Grosjean, Serĝo Sir'.

Kotizoj 2010 al SAT-Amikaro, inkluzive de abono al "La SAGO": 35€

Prezo por unu ekzemplero: Francio, Belgio: 3,60 €; Svisio : 3,80 F.S. ; aliaj landoj: 4,60 €.

Abono 2010 al la revuo, sen aliĝo al SAT-Amikaro: Francio, Belgio : 32 €; Svisio : 43FS; aliaj landoj : 39 €.

Por pagi:

■ **En Francio:** SAT-Amikaro

CCP: 37 852 90 L La Source.

N° IBAN, (por pagi el fremda lando):

SAT-AMIKARO.

FR32.2004-1010-1237-8529-0L03-314

BIC: PSST FRPPSCE

■ **En Belgio:** Claude Glady :

Bankkonto N° 750-6373051-18

IBAN B50 7506 3730 5118 BIC: AXABBE22

■ **En Svisio:** Mireille Grosjean :

Poŝta konto n° 23-14908-9.

Kiu faras Kion?

Directeur de la publication: Guy Cavalier.

Ĉefredaktanto : Vito Markovo.

Enpaĝiganto: Serĝo Sir'.

Korektskipo : Andreo Andrio, Ĵak LePuil,

Vito Markovo, Serĝo Sir'

Helpas al la korektado: Janine et Yannick

Dumoulin, Veronique Girard, Phil Guichet,

Maksimiliano Gverino.

KONTRIBUAĴOJ BONVENAJ! SENDU ILIN:

■ Prefere per reto, al lasago@free.fr, tekstoj en RTF aŭ TXT formo por aneksitaj dokumentoj, eventuale en la korpo mem de la mesaĝo, skribitaj per ajna sistemo de ĉapeligo (sed Unikodo preferata), bildoj en TIFF, JPEG aŭ GIF formo.

■ Eventuale sur papero, tekstoj *prefere* tajpitaj, sen forstreko nek surkorekto (erarojn eventualajn, oni indiku marĝene) al La SAGO, ĉe Serĝo Sir'. (ne tajpitaj kontribuajtoj publikeblas nur se troveblas volontula tajpanto)

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Represo de artikoloj permesata kun indiko de la fonto

Adresaro

La SAGO-abonoj: ĉe la sidejo,

La SAGO-redaktado: ĉe Serge Sire.

Sidejo de SAT-Amikaro: 132/134 boulevard Vincent-Auriol 75013 Paris

Tel. : 01 44 24 50 48 kaj 01 44 24 50 02

TTT-ejo : <http://www.esperanto-sat.info>

Reto: sat-amikaro@wanadoo.fr

Claude Gerlat 11 bd Maréchal Leclerc 38000 Grenoble tel. 04 76 01 91 71

Reto : claud.gerlat@orange.fr

Claude Glady : Rue du Culot, 1; B-5630 Cerfontaine; Reto: cglady@arcadis.be
Tel: 071/64 49 16 (en Belgio).

Mireille Grosjean : Grand-rue 9, CP 9 CH-2416 Les Brenets

Serge Sire (Serĝo Sir')

85 impasse des Fées 74330 Sillingy
Reto : lasago@free.fr

SAT: Abono al "Sennaciulo" 2010: 57 €

■ **En Francio:** Pierre Quillaud; 16 rue du Lt-Vaisseau-Paris 76120 Le Gd-Quevilly p.k. SAT-Peranto 17 333 10 N Paris.

■ **En Belgio:** Jakvo Schram; Hof Ter Bekestraat 49 BE-2018 Antwerpen p.k. 000.1692025.54 (Schram - SAT).

**Atentu !
Nova peranto en Belgio.
Bonvenon !**

Kiel traduki Fin

En la unua parto de tiu artikolo mi konsideros la substantivon **fin**, kiu havas du ĉefajn signifojn: **fino** kaj **celo**.

♦ Kiam la franclingva substantivo **fin** signifas la ĉeson aŭ ĉesigon de ago, ĝi ĝenerale tradukiĝas per **fino** aŭ per vorto havanta la saman radikon; ankaŭ kiam ĝi signifas la lastan parton de objekto, de daŭro aŭ de ago. Kiel kutime, en kelkaj okazoj alia vorto estas preferinda.

Ĉi-sube estas kelkaj ekzemplaj frazoj:

À la fin du mois.	Ĉe la fino de la monato.
Fin mai.	Fine de Majo.
Du début à la fin.	De la komenco ĝis la fino.
Tu m'ennuies, à la fin!	Vi tedas min, finfine!
Arriver à la fin d'un livre.	Atingi la finon de libro.
Laisser à quelqu'un le mot de la fin.	Lasi al iu la lastan vorton.
La fin de la journée a été belle.	La fino de la tago estis bela.
La fin du film est très amusante.	La fino de la filmo estas tre amuza.
Pour certaines familles la fin de mois est dure.	Por iuj familioj la monatfino estas malfacila.
La fin du monde n'est pas encore arrivée.	La finiĝo de la mondo ankoraŭ ne okazis.
La fin prématurée d'un héros.	La antaŭtempa fino de heroo.
C'est la fin de tout;	Nenio espereblas.
(pop) c'est la fin des haricots.	
Mettre fin à la crise.	Meti finon al la krizo; ĉesigi la krizon.
Mettre fin à ses jours.	Sin mortigi.
La réunion prendra fin à 10 heures.	La kunveno finiĝos je la 10a.
Discourir sans fin.	Paroladi senfine.
Tout a une fin.	Ĉio havas finon.



Conduire un projet à sa fin. Alfinigi projekton.
Mener à bonne fin un travail. Bone alfinigi taskon.



LibroServo

Sat-Amikaro libroservo

132-134 bd Vincent-Auriol 75013 Paris
 Telefono : 01 44 24 50 48 (Vendrede 9H30-17H;
 Sabate 11H-18H)
 Retadreso: libroservo@sat-amikaro.org
 CCP : Sat-Amikaro Libroservo Paris 261211 57 G



Sendkostoj
 Al ĉiu mendo
 aldonu:
 40 % ĝis 5€
 35 % ĝis 10€
 25 % ĝis 20€
 20 % ekde 20€

Junulkurso 3a eldono kun komentoj franclingvaj	7,00
Kasedo de Junulkurso, internacie uzebla	7,00
Espéranto Éclair (Raymon Gueguen)	4,00
Cours Rationnel d'Espéranto, édition 2006, broché	10,00
Petite grammaire d'espéranto (Claude Gerlat)	6,00
Communication linguistique (Claude Piron)	5,00
Une humanité, une langue (Simone Glodeau)	2,30
La langue internationale (Raymond Gueguen)	8,00

Dictionnaire pratique (Fr-Eo / Eo-Fr) eldono 2000 formato 140 x 200, tole bindita	23,00
Dictionnaire de poche (Fr-Eo / Eo-Fr) reviziita eldono 2005 formato 105 x 150, 130 paĝoj	4,30
Grand Dictionnaire Espéranto-Français (Gaston Waringhien), 3a, reviziita kaj plibonigita eldono, tole bindita.	23,00
Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, eldono 2005 formato 155 x 245, bindita	80,00

Novajoj




Beletra Almanako

N-ro 6 (Oktoebro 2009)

ISBN 978-1-59569-144-6 / ISSN 1937-3325

Redaktas Jorge Camacho (ĉefred.), Probal Daŝgupto, István Ertl

Tolbidoj:
Amparo
de la Sota



Ĉi-numero:

Prozo..... Originala: Tim Westover
 Debatoj..... Geoffrey Sutton, Ken Miner, Joxenari Sarasua, Baldur Ragnarsson
 Artikoloj..... Mauro Nervi, Jorge Camacho
 Eseo..... Originala: Paul Gubbins, Ana Manero, Sten Johansson, Ricardo Albert Reyna
 Recenzoj..... de Björn A. Bojesen
 Belartaj Konkursoj..... Premitaj verkoj de Julia Sigmond, Sten Johansson, Nicola Ruggiero, Jean-Marie Ries, Folke Wedlin, Lena Karpunina, Geraldo Mattos, Luiza Carol, Raporto de la Prezidanto: Humphrey Tonkin

MONDIAL NOVJORKO

www.librejo.com

Prezo : 8€



185 paĝoj, 15€

Ce chômeur est en fin de droits.

Les «fins de droits» risquent de devenir des SDF.

Ce coureur de jupons a fait une fin en épousant une veuve

La courroie sans fin transmet un mouvement d'une poulie à l'autre.

Une vis sans fin aussi peut servir à transmettre un mouvement.



Tiu senlaborulo ne plu rajtas monsubtenon; ... atingis la rajtofinon pri monsubteno.

La «rajtofinuloj» riskas fariĝi senhejmluloj.

Tiu amoristo laŭnormiĝis edziĝante kun vidvino.

La senfina rimeno transmisias movon de unu pulio al alia.

Ankaŭ senfina ŝraŭbo povas uziĝi por transmisii movon.



♦ La sama vorto **fin** povas ankaŭ signifi tion, kion oni penas atingi aŭ plenumi, do la **celon**:

En venir à ses fins. Atingi sian celon; sukcesi.

La fin justifie les moyens. La celo pravigas la rimedojn.

L'argent est un moyen, pas une fin en soi. Mono estas rimedo, ne absoluta celo.

À cette fin. Tiucele.

Je prends mon chapeau, à toutes fins utiles. Mi kunprenas mian ĉapelon cele al laŭbezona uzo.

Il fait cela à seule fin de se montrer. Li faras tion nur por elmontriĝi.

Andreo Andrio



Libro vivas pli longe ol unu sezono...

Sufiĉas rigardi la multnombrajn tablojn plenplenajn de libroj, dum SAT-Amikara kongreso, por konscii, ke libroj havas longan – foje eĉ tro! – vivon... Sed kiel la klientoj de la libro-servo povas orientiĝi antaŭ tiuj centoj da titoloj? Ja recenzoj aperis siatempe, sed kie legi ilin? Malfacila tasko! Do, por helpi la legantojn, ŝajnas ke utilas regula rubriko kun prezento de libroj eldonitaj jam de pluraj jaroj.

Vivi sur barko

Omaĝe al Madeleine de Zilah, kiu mortis la 27an de novembro.

Eugène de Zilah, serio Kargo, eldonejo Jean-Claude Bernard, Francio, 1994. 235 paĝoj.



Jen kion mi skribis en LKK-73, de 1995:

«Granda amaso el tiuj, kiuj neniam pekis, rajtas denun aljeti siajn ŝtonojn, ĉar tiu ĉi letero estas elsendita», skribas de Zilah (Eugène, ja, sed silent! nia filozofo ne ŝatas sian propran nomon.

Kial do li ne elektis alian?) en sia «averto».

Unue mi devas konfesi ke tian «leteron» mi ŝatus ricevi ĉiutage (ni diru ĉiusemajne... aliel mi legus ĉiunokte kaj ne restus tempo por dormi...), kaj due ŝtonojn senpekuloj ĉiam aljetas al tiu kiu kuraĝas ion entrepreni.

Senpekuloj = fridpisuloj.

Ĉio ekis antaŭ ses jaroj. Tiam la aŭtoro iĝas 51-jara kaj ne plu eltenas la premon de la «ĉiutaga» vivo (mi ne plu memoras kiu skribis: «Ho! kiom ĉiutaga 'stas la vivo!). Ja kelkaj bonŝancaj rifuzi tiun ĉiutagecon ekde junaĝo (mi havas tiun ŝancon, dankon), sed plejmulto neniam kuraĝas realigi siajn dezirojn. Mi ne dubas ke je tiu aĝo, kun bona situacio, burĝa komforto, la decido ĉion forlasi, forvendi, por vivi sur barko, postulas kuraĝon.

Instruisto, de Zilah de longe konsciis pri netaŭgeco de la eduk-sistemo. En tio li entute pravus. Li bedaŭrinde neniam parolas pri la eksperimentoj de Sébastien Faure, Paul Robin, Francisco Ferrer, k.a. Kun Malraux li nur «elite» rezonadas, refoje montras ke la «popolon» li ne konas aŭ mistaksas... Sed kiu jam legis la prozon de nia aŭtoro ne miros. Ĉiel ni povas nur ĝui pri

la decido de la ge-de Zilah – Ha! Lena, plej elstara homo laŭlonge de tiu 'letero' – forlasi socion kie paro alvenanta al liceo man-en-mane 'stas riproĉita de kretenaj superuloj... «Kaŝu tiun amon...»

Kaj jen **Kerguelen!** 12-metra velbarko. Ek al aventuro! Des pli por nespertulo kiu ĉiam vundas siajn manojn (tion mi bone konas, dankon!), siajn tibiojn, plurfoje tanĝas morton. Anhelante, vi voros tiujn paĝojn kie ĉiulinie vi tremos kun Eugène (ho! pardonon!) kiu baraktas kontraŭ iu *Boforto* (multe pli danĝera ol iu *de Bofronto!*) nekompata eĉ al freŝbakita «marhundo»! Mortis Tibor Sekelj, alvenas de Zilah, alia elstara rakontisto!...

Sed nun sufiĉas mia prozo! Ĝuu tuj ekstrakton el la ĉapitro «Enbarkigo al Citero», kiam nia kapitano ĝojis, «ĉar je la unua fojo mi ne sentis min komencanto».

Jak Le Puil

... Ĉi tiu homa libereco riveligas sur *Kerguelen* per la tri veloj streĉitaj, la vento siblanta en la du intervelaj koridoroj, kaj malforta kliniĝo. Fariĝas manifeste, ke la vento ne pelas, sed suĉas la velojn. La movforto estas vakuo kreita malantaŭ la veloj. Aldone al intelekta kontento, ni havas 5-nodan rapidon. Ni boardas ĝis tagmezo, tiam la vento ĉesas. Lena vekigās, sin lavas, sin kombas, kantetas, forgasas vestiĝi, kaj ŝia parfumo okupas la tutan spacon. Apud la insulo, kie naskiĝis Afrodita el spermoŝaŭmo de deŝirita, marenjetita virajo de Urano, ni amoras sur la afgana tapiŝo en la salono. Afrodita estas diino de deziro kaj amoro, ne nur, kiel oni false certigadas, de amo kaj belo. Mi ne estas la unua viro frenezigita per ŝia ora zono.

Citero estas inda je Afrodito.

Nin puŝis mola venteto uesta al Kapsali-golfeto, ŝirmejo malkomforta sed unika en la sudo de la insulo. Ĉiuj gvidosignoj estis klaraj: unue la Ovo-insuleto, fronte al la eniro de la golfeto, kiu vere havas ovan formon, poste la fortreso, du blankaj domoj kaj la lumturo. Ni malhisis la velojn, startigis la motoron kaj alŝipis la haveneton. Oficialulo ordonis al ni per nekompreneblaj krioj sed evidentaj mansignoj fiksiĝi pobe kontraŭ la kajon, en spaco restinta inter pruoj de peskobarkoj paralelaj al la kajo triborden kaj pruo de peskoŝipo baborden. Mi maltrafis la unuan manovron jetinte tro foren mian ankron, kaj sukcesis la duan. Ni estis ĉekaje en malampleksa haveneto kaj ni nenion frakasis. Mi prenis min por olda marhundo. Mi ĝuis la aprobajn rigardojn de peskistoj atentantaj

mian manieron, nejektulan, nodi miajn ŝnurojn. Lecionoj de Andreas. Lena komencis kuiri ian vespermanĝon, kies odoro certe ĵaluzigis la apudajn grandajn jaktojn. Mi iris ĝis la havenestrejo por koni la meteon. Ĝi jam estis fermita kaj la meteobulteno ne estis afiŝita. Mi revenis al la jakto pensante pri la ĝojo de Lena, kiam morgaŭ ni vizitos ĉi tiun pentrindejon. *Kerguelen* estis bela sub la luno. Ni vespermanĝis sur la ferdeko pladon indan je Lena, Afrodita kaj Citero. Poste sur la lito de nia kajuto ni junulumis, sed ĉi tio estas deviga je alveno Citeron.

Aĥ! tiu «junulumis», kiun nur vera verkisto povis pensi... Mi cetere tuj pensis pri belega kanzono, «Neniam ni 'stos maljunaj» kiun verkis kaj kantas Bernard Joyet...

Nun elĉerpita, sed espereble baldaŭ reeldonita !

Unua listo de la kongresanoj

Charly Mamp. ANDRIAMIHAJA
Monique ASSAILLY
Geneviève ASTIER
Jacques BARATIE
Élisabeth BARBAY
Francis BERNARD
Monique BERNARD
Hélène BÉTEAU
Willy BÉTEAU
Robin BETO
Véronique BICHON
Stéphane BLAEVOET
Carlo BOURLOT
Christiane BOUTIER
Simone CAJELOT
Roger CALLEMARD
Jeanne-Marie CASH
Jacques CAUBEL
Denis CLOPEAU
Manjo CLOPEAU
Josette CORGNON
Denezza CORMICHER-LE FOL
Maya CORNUEJOLS
Françoise DARRIEUX
Gilbert DARRIEUX
Francis DESMARES
S-ino DESMARES
Hélène DUBOIS
Jean-Claude DUBOIS
Jean-Pierre DUCLOYER
Josette DUCLOYER
Monique DUSSENY
Guzimir DUPOVIC
Yves DUSSEY
Françoise ERIKSEN
Jean-Pierre FEDAK
Marie-Thérèse FEDAK
Micheline GALLIAN
Christiane GASSE
Geneviève GAUBERT
Jacques GAUMÉ
Marie-France GAUME
José GILABERT
Paola GIOMMONI
Véronique GIRARD
Monique GRALL
Henri GRAVEN
Claire GUERIN
Philippe GUICHET
Françoise GUIHAUME
Lucie HULOT

Michèle JAGUENEAU
Pierre JAGUENEAU
Jean Hervé JAOUEN
Louis JEULAND
Nathalie KAMPIANNE
Ginette LASCOURS
Denise LE BRIZAUT
Jean-Louis LE BRIZAUT
Armela LE PUIL
Jak LE PUIL
Bernadette LEMARCHAND
Henri LEMARCHAND
Anne Marie LEPROVOST
Franjo LEVEQUE
Teo LEVI
Béatrice MANDOLA
Michel MARKO
Ansofi MARKOVO
Flora MARKOVO
Lino MARKOVO
Vinko MARKOVO
Vito MARKOVO
Hélène MARLIN
Guy MARTIN
Floréal MARTORELL
Françoise MATHIEU
Jacqueline MAUREL
Gisèle MICHAUD
Fabrice MORANDEAU
André MORIO
Christiane MORIO
Marc NOEL
Marie-Odile PERY
Jean-Louis POULLET
Denise PRIE-LE FOL
Bernard REIFFSTECK
André RIGault
Louise RIGault
Atilio Orellana ROJAS
Françoise ROUBIN
Régis SABATIER
Thérèse SABATIER
Serge SIRE
Josette STRIDE
Moline STRIDE
Philippe STRIDE
Rodica TODOR
Gabrielle TREANTON
Lucia UNIA
Solange VAN LAN DEGHEM

Bordoza (33)

Post invito de la esperanta grupo de Galgon (Girondio), ses el ni partoprenis la Zamenhofan Tagon en tiu vilaĝo.

Matene, post konatiĝo de la ĉeestantoj kaj diversaj informoj, oni prezentis al ni tre interesajn lumbildojn kaj tekston tradukitajn por la komencantoj kaj ne-esperantistoj (kun ni ĉeestis juna amikino itala, kiu preskaŭ la tuton komprenis en Eo) pri la unua esp-grupo en Bordoza

Agrabla tagmanĝo kaj muzika aranĝo pere de akordiono sekvis. Malfeliĉe, ni devis foriri antaŭ la fino.

La 28an-29an-30an de januaro, ni gastigis japanajn amikojn, Hori Yasuo kaj Arai Toshinobu.

La 29an, vespere, ili prezentis prelegon, en Kvartala Domo «Philippe Rossetti».

Espéranto Bordeaux-Ouest 19, rue Dédé 33200
BORDEAUX CAUDERAN
Tél. 05.56.28.89.20

Boureso (86)

Kvinpetalo 15 rue du Lavoisier F-86410 BOURESSE
<http://www.kvinpetalo.org/>

Staĝo en februaro: 24a-27a Praktikado de la lingvo (1a aŭ/k 2a grado) kun Ansofi Markov.

Reto

Ne forgesu, se ne jam farite, subteni la proponon aldoni la esperantajn ĉapelitajn literojn en la disponebla tiparo de la poŝtelefono «Android» de «Google». Alklaku la steleton supre-dekstre de «Issue 1730: Add Esperanto characters» ĉe <http://code.google.com/p/android/issues/detail?id=1730>

Plu mankas minimume 900 voĉoj.
Endas enskribiĝi, sed simple farebla.

Informas **Frederiko Scibor**

El niaj amikaj organizoj: *Espéranto-France*

La venonta kongreso de Espéranto-France okazos samtempe kaj samloke kiel la kongreso de Germana Esperanto-Asocio de la 21a ĝis la 24a de majo.

La urbo Kaiserslautern estas facile atingebla. Bonaj trajnaj konektoj. La kongresejo estas en la koro de Kaiserslautern en agrabla ĉirkaŭaĵo (piedira zono). Multaj restoracioj, kafejoj, terasoj apude. Hoteloj ne tre for.

Al la tradiciaj kaj statute devigaj kunvenoj aldoniĝos prelegoj, forumoj,

diskuttrondoj... Okazos distraj vesperoj kun artistoj el Germanio kaj Francio, kaj verŝajne ankaŭ el aliaj landoj. Denove okazos movada foiro en la komenca vespero. Funkcios libroservoj.

Oficiala fino de la kongreso estos lunde (24-05-2010) per solena fermo post la tagmanĝo. Post ĝi okazos ekskurso posttagmeze kaj tuttaga ekskurso dum mardo (25-05-2010). Detaloj sekvas.

La loĝadon transprenos la turisma servo de la urbo. Ni rekomendos al vi

ĝustatempe favoreprezajn eblojn. Same sekvos informoj pri antaŭmendendaj komunaj manĝoj kaj ekskursoj.

Informoj kaj aliĝilo ĉe la retpaĝoj de Espéranto-France.

<http://esperanto-france.org/kaiserslautern2010>

kaj ĉe la sidejo de Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, 75004 Paris

Informas **Claude Nourmont**

Esperantistoj aktivas

Agajo (83)

27/02-06/03/2010 : Mediteranea Esperanto-Semajno

27-a februaro ĝis 6-a marto 2010

Se ankoraŭ frostas en via regiono, venu al la Mediteranea Maro, kie floras mimozoj kaj migdalarboj. Vin atendas amika, familia etoso, belegaj pejzaĝoj, bona ripozo kaj



lazura maro !!!

Vipovas plibonigi vian nivelon de Esperanto partoprenante en kursoj
Gvidantoj de kursoj estos :
- 1a Kurso : Rafael MATEOS
- 2a Kurso : Malcom JONES
- 3a Kurso : Waldemar LIPOWICZ

Posttagmeze, vi mem elektos vian programon: promenado, piedirado en la montaro Esterel (kunportu viajn marŝoŝuojn), familia vivo ĝis la vespero. Distraĵoj.

La studejo estas komforta hotelo «Le Renouveau» en Agay (ĉe Saint-Raphaël). Francio

Aliĝkotiĝo : 60 eŭroj (familia aliĝkotiĝo : 100 eŭroj)

NFORMOJ KAJ ALIĜOJ :

Parizo (75)

La 13an de decembro 15 parizianoj matene kunvenis SAT-Amikareje por bilanci pri la pasinta agadaro kaj ekplani la venontan. Post komuna tagmanĝo la festan posttagmezon okupis kantado, babilado k amuza rolludo (temis pri kompletado por faligi tiranon!) kiujn vikle partoprenis ĉiuj improvize rekte en esperanto.

Informas **Vito Markovo**



Monique Prezioso, 92 impasse Jean Moulin, FR 83700 Saint-Raphaël, Francio rete : prezmoni@hotmail.com ; tel. 0033 (0)4 94 83 06 88

Christine Graissaguel, Les Iles d'Or, rue du progrès, FR 83600 Frejus, Tel. 0033(0)494956618

Parizo (75)

Sukcesa la 6-a trinkejumado Pariza

Interesa estas la origino de tiuj nun tradiciaj monataj e-renkontiĝoj. La ideo venas de Erikano Hamelino (Eric Hamelin) k alia amiko, Bernardo, samkvartalanoj, kiuj sendepende eklernis per la reto k ankaŭ perrete ekkonis unu la alian, konstatinte ke ili loĝas samkvartale en Parizo. Simple serĉante krei okazon ekpraktiki la freŝe lernitan lingvon parole, ili unue celis ke tiuj trinkejaj rendevuoj okazu ĉiam en la 10a kvartalo, kie ili loĝas. La du unuaj ja okazis en tiu ĉi kvartalo, k poste estis proponite ke ĉiufoje estu en malsama loko en Parizo, por trafi alian publikon k malkovr(ig)i aliajn partojn de Parizo.

Celataj estas ĉiunivelaj esperantistoj k esperantemuloj. Preskaŭ ĉiufoje ĉeestas ankaŭ eksterlandanoj, kiuj ne parolas la francan, k internaciigas la etoson.

Baza principo estas, ke oni alportu librojn, revuojn, varbkalendaretojn, ĉion kio povas helpi homojn malkovri esperanton, k se eble proponi e-metodon al la vizitantoj por ke la homoj povu memlerni rapide la bazajn aferojn. Do ne nur kunveno inter e-istoj por praktiki, sed ankaŭ (eĉ ĉefe) malferma al ekstera publiko por varbi.

Ĉiufoje pli malpli 30 homoj (maks. 40) partoprenis la eventon.

Novembre estis en asocia trinkejo «La Komunumo» en la 12-a kvartalo, ĉe la Aligra strato, pro tio ke en ĝi anas Filipino Debriks (Philippe Debrix). Li estas freŝdata e-isto kiu multe aktivas en la kvartala asocia vivo. Li proponis, ke li preparos manĝaĵojn vendotajn ne-profitociele k petis helpon de mi por tio.

Erikano proponis, ke tiuj kiuj volas venu kun muzikinstrumento. Plejmulto ne venis kun propra instrumento, sed tamen troviĝis jam pigno, kiu ne restis neuzita, ĉar ĝin malmutigis lerte Gijom' per originalaj kantoj en eo mem verkitaj k muzikigitaj. Kantis ankaŭ el Kamerunio Duh' Muele' (Dooh Mwelle) memakompanate per gitaro, en eo k loklingve, post deĵorado ĉe la kuirado. Antaŭ tio venis iom surprize,



neatendite sed tre bonvene, muzikgrupo el Arlezo, kiu plaĉe vigligis la etoson dum granda parto de la vespero helpe de simplaj, sed trafe muzikaj voĉo, gitaro k perkutito. La zorgo memfaritan manĝon ŝajne frandis la ĉeestantoj samtempe kiel la muzikon. Entute ĉeestis ŝajne samkvante e-istoj k nee-istoj, kio ebligis interesajn interŝanĝojn k diskutojn.

Fani' Erant' (Fanny Errant), ano de la Aligra Komunumo

NdR: intertempe okazis k la decembra k la januara rendevuoj, ambaŭ sukcese, k interalie laste kun inicado al eo per du bildoprezentoj (1a pri la lingvo mem, 2a pri eo k interreto). Por ĉion scii pri la venonta rendevuo: cafe_esperanto@orange.fr

La birdoj de la golfeto de San-Briego



Canard siffleur
Fajfanaso



Tadorne de belon
Tadorno

La produktiva riĉeco kaj diverseco de la medio estas atestita de la ĉeesto de birdfaŭno. Laŭ la kvanto kaj laŭ la diverseco de birdoj la sanbriega golfeto unuarangas. Ornitologie, la fundo de la golfeto de San-Briego situanta sur akso de manik- atlantika migrado estas agnoskita kiel vasta strando kun internacia intereso.

Migrado kaj travintrado de birdoj en la san-briega golfeto

Je la finsomero pelitaj de malvarmeco milionoj da akvaj birdoj, deiras siajn restadajn zonojn de Arkto kaj Nord-Eŭropo por travintri sub pli mildaj klimatoj kie abundas nutraĵoj. Tiaj migradoj ne hazarde okazas. La birdoj sekvas precizajn vojojn, ripozante en humidaj zonoj kie ili fortigas sin antaŭ ol suden pluflugi, aŭ haltas por plilonge travintri.

Printempe inverse ili reflugos al la nordaj landoj kie ili reproduktiĝis.

La sanbriega golfeto estas de novembro ĝis februaro travintrada spaco ĉefe por la anserformaj birdoj (anseroj, anasoj kaj cignoj); la ŝlimloĝaj vadbirdoj plilonge vizitas la golfeton, nutriĝante per ŝlimbestetoj.

Se, al tiuj, oni aldonas 20 000 laridojn (mevoj kaj laroj), la san-briega golfeto ĉiuvintre gastigas, proksimume (average) 40 000 akvobirdojn. Tie ili trovas idealajn kondiĉojn por travintri: gravajn nutrajn vivrimedojn, mildan klimaton kaj ampleksan rifuĝejon kontraŭ la predantoj.

Tiu granda ŝlimejo, kie dum vintro svarmas maraj kaj akvaj birdoj, inverse estas mirinde kvietaj dum printempo. Fakte tiuj grandegaj etendaĵoj rekovritaj de tajdoj ĉiutage, lasas malmulte da spaco por la nestado. Nur salkampoj, dunoj aŭ klifoj ebligas reproduktadon

de tadorna anaso, verdkola anaso, karadrieto, flava kaj printempa motacilo, kanbardo aŭ akrocefalo, kana emberizo, alciono, kampa alaŭdo, pipio, kanabeno (*tadorne de belon, canard colvert, petit gravelot ou pluvier à collier, bergeronnette flavéole et printanière, rousserolle effarvate, bruant des roseaux, martin pêcheur, alouette des champs, pipit farlouse, linotte mélodieuses, ...*)

Tiu golfeto estas ankaŭ grava loko por longdistancaj migruloj kiuj ĉiujare, vintrofine kaj somerfine, haltas ĉi-tie por refortiĝi antaŭ ol daŭrigi sian periplon (Sankta-Martena cirkuo, kana cirkuo, blanka kuleranaso).

Graveco de la golfeto

Meznombro la san-briega golfeto gastigas proksimume:

- 11% el la laponaj limozoj (*barges rouges*)

- 10% el la grandaj kalidroj (*bécasseaux maubèches*)

- 4% el la hematopoj (= marpigoj : *huitriers-pie*)

el la tuta membraro travintranta en Francio.

Hodiaŭ pli ol 4000 kolringaj anseroj (*bernaches cravant*) travintras en la golfeto, t.e 4,5% el la nacia kvanto kaj pli ol 1% el la monda. Tiuj nombroj agnoskigas internacian gravecon al la golfeto de San-Briego.


<http://www.reservebaiedesaintbriec.com/IMG/pdf/dossiers/bernacheCravant.pdf>

<http://www.reservebaiedesaintbriec.com/IMG/pdf/lettre32.pdf>

Rolande N, Amapola T, Laurent P, Marie Madeleine L, Alain LM, Marie Pierre G, Rolande S, Franjo L.



Bernache cravant
Kolringa ansero



Aigrette garzette
Eta egretardeo



Huitrier pie
Marpigo.



Courlis cendré
Numenio cindra



Grand gravelot
Karadrio